

Protokolo de la 48a senatkunsido (42a post la oficialigo de AIS fare de la Konsilio de la XII, 51a post la fakta eklaboro) okazinta en Milano (I) en la konstruaĵo de IULM je 26.10.2002, 16.00 h–19.00 h, kaj en seminariĉambro de la hotelo Stellite je 27.10.2002, 9:30 h–14:00 h, 16:00 h–20:00 h

Ĉeestis gekolegoj Fössmeier, Frank, Holdgrün, Lewoc, Minnaja, Pennacchiatti, Quednau. Kolegoj Maitzen kaj Wickström anoncis sian neĉeeston.

La Senato aprobas la protokolon de la 47a senatkunsido en Nitra/Komárno. La proponitan tagordon kun kelkaj aldonoj la Senato akceptas en reordigita laŭ urĝeco formo. La vicprezidanto petas, ke ĉiu senatano ne havonta por pli longa tempo retaliron (ekz. pro vojaĝo) anoncu tion.

Rilatoj al IULM: La biblioteko de la longjara eldonantino de „Heroldo de Esperanto“, Ada Sikorska, estis transdonita de d-ro Silfer al la libera universitato IULM en Milano (ekde 1998 „Libera Universitá di Lingue e Comunicazione“, fondita en 1968 sub la nomo „Istituto Universitario di Lingue Milano“). Pro tio la vicrektoro kaj dekanano de IULM por la fakultato pri lingvoj, profesoro Negri, ekinteresigis pri ILo kaj la aktivajoj de AIS, ne laste pozitive influite de la instrua engaĝo de Senatano Pennacchiatti. Kun danko kolegoj Frank, Minnaja kaj Selten akceptis la inviton de IULM por pli detale prezenti la ĝi nian akademion.

La Senato aprezas la eblecon firmigi la kontakton inter IULM kaj AIS. Aldone al la du jam ekzistantaj fakultatoj de IULM, AIS povas ekzemple oferti, laŭ la modeloj en Sibiu kaj Komárno, liberan fakultaton de AIS ebligantan al ĉiuj efektivaj membroj de AIS instruadon ankaŭ en IULM, kio pliriĉigus la instruprogramon kaj kromstudajn fakojn al la studentoj de IULM. Antaŭ konkreta iniciato kolegoj Minnaja kaj Pennacchiatti neformale esploru kune kun la prezidanto la koncernajn eblecojn.

Lige al tio kaj laŭ la ideo de la prezidanto, disvastigi la internacilingvan literaturon per ĉiuj bibliotekoj de la mondo, koncernaj senkostaj (kontraŭ nuraj sendokostoj) ofertoj estu direktitaj ankaŭ al IULM. La Senato laŭde atentigas, ke por la supre menciita ampleksa librostoko estas jam verkita ĉe IULM detala katalogo de sinjoro Mon-

Arta Sektoro de AIS kun profesora titolo pri arto. Samtempe li membriĝu en la Scienca Sektoro. AIS esperas, ke li pretas proponi taŭgan strukturigon de la Arta Sektoro.

Agadoj en Komárno (Slovakio). En Komárno estu starigita filio de AIS kun trikapa rektoraro, nome kolegoj Frank, Selten kaj Szabó (dekanano de la pedagogia fakultato en Nitra). Ĝi transprenu la taskojn, kiujn estus havinta la Universitato Kelemania, se ties fondado estus okazinta. La filio daŭrigu la registron de Nitra. La Senato atentigas, ke la statutpropono por Sibiu, kiu servu ankaŭ kiel modelo por Komárno, estu korektita rilate la devigan uzadon de ILo por originalaj disertaĵoj. La prezidanto Frank pretas per privata investo transpreni la plejmulton de la kostoj de konstruaĵo en Komárno, en kiu la filio havu sian bazon. La plejmulto de la Senato aprobas, ke Akademidomaro, de kiu AIS posedas akciojn, subtenu finance la aĉetadon.

Situacio en RSM: La Senato tre dankas al kolego Minnaja, kiu zorgis dum la lastaj jaroj pri adaptigo al la aktualaj leĝoj de la statuto de AIS, aprobobla de la registaro de RSM. Se dum la venontaj tri semajnoj estas atingebla definitiva jesa respondo el RSM, tiam SUS 26 okazu en la liceo en San Marino Città, alikaze plejgrandparte en Rimini. La Senato akceptas samtempan al SUS 26 okazigon de Simpozio Latina laŭ la antaŭa modelo. La Senato fiksas la plej gravajn datojn de la sesio.

La Senato akceptas la bonvenigon de la prezidanto, ke en San Marino je 5.9.2003 estu montrota filmo prezentanta SUSojn kaj la AIS-laboron, prokduktita en la kadro de kurso de ADoc. Lewanderska-Quednau. La filmon AIS ricevu donace. La filmo ekestis sen oficiala taskigo aŭ konfirmo fare de AIS.

Agado en Pollando: La studentoj en Bydgoszcz ĝis nun bonintence turniĝis al Monda Turismo kiel reprezentanto de la ĝisnuna tiea klerigejo de AIS. La retenitaj informoj pri la ekzameno de la studentino Dhami klare montras, ke AIS ne povas fidi apogi al kunlaboro kun Monda Turismo, kaj la Senato decidas, ke AIS ne plu kontraktu kun senperaj kunlaborantoj de Monda Turismo. MT kaj la el ĝi sekvontaj organizoj ne rajtas fari proponojn aŭ agi en al nomo de AIS.

La Senato estas informita, ke nova organizaĵo „Internacia Studumo pri Kulturo kaj Turismo“, ISKT, transprenis la taskojn kaj la studentojn de la ĝisnuna „Internacia Studumo pri Turismo kaj Kul-

⇒
evidente
okazis
elfalo

turo“, ISTK (suborganizo de MT), kun samaj kunlaborantoj. La Senato substrekas, ke la kunlaboro kun ISTK estas finita pro la leteroj de la gvidantoj de Monda Turismo, kiuj atingis la Senatanojn en Nitra kaj kiuj definitive ĉesigis la kontrakton inter MT (ISTK) kaj AIS. Nova kontrakto al iu organizo en Bydgoszcz eblas nur sub pli severaj kondiĉoj kaj nur kun organizo, kies gvidantoj subtenas AISon.

La Senato unuanime decidas: En Bydgoszcz ne plu okazu ĝis la fino de la deĵorperiodo de la nuna Senato ajna ekzamensio (BUS/SUS). Konsiderante la bezonojn de la studentoj en Bydgoszcz la Senato decidas, ke tie AIS strebu starigi institucion kun la nomo „AIS-klerigejo Bydgoszcz“, kies reprezentantoj estu la efektivaj membroj Lobin, Mielcarek, Quednau kaj eventuale – se ŝi pretas kunlabori – kolegino Kowalczyk. Kun tiu klerigejo AIS povas fari kontrakton. En tiu fondota klerigejo la instruarajtoj sekvas el la aktuala regularo pri kleriginstitucioj. [Korekto de la 49a kunsido: „La instruarajton havas tiuj personoj, kiuj rajtas instrui ankaŭ dum neSUSaj studadsesioj de AIS.“] Agnoskeblajn studunuojn povas akiri nur studentoj de AIS posedante validan legitimilon. Ĉiu tia studento devas esti gvidata de efektiva membro de AIS. Aliaj studentoj estas allaseblaj al la kursoj kiel gastoj-aŭskultantoj.

Du proponojn, nome tiun de la direktoro de la Klerigofico per rondletero antaŭe cirkuligitan kaj tiun de sinjoro Grzębowski pri la maniero redukti la ŝuldojn de MT, la Senato malakceptis.

Sesio en Sibiu en februaro 2003: Por la starigata fakultato en Sibiu devas esti prezentitaj projektoj. La Senato rajtigas negoci kun la universitato en Sibiu pri la detaloj la prezidanton, kiu nepre konstante kaj senprokraste informu la Senatanojn pri la stato. La antaŭvidita kontraktdato estu la 22.2.2003, por ke somersemestre je 2003 jam enskribiĝu studentoj de la fakultato kaj en septembro samjare okazu la inaŭguro. La 22.2.2003 estas dato post la 70jariĝo de la prezidanto, kiu invitas tiuokaze al Sibiu. La plimulto de la Senato jesas samtempan kaj samlokan senatkunsidon.

Sesioj en Germanio, Italio kaj Svedio: En Germanio je la jarfino ne okazu studadsesio pro manko de anonciĝoj. Por la paska studadsesio en Italio oni esploru ankoraŭ la eblecojn. Dum la UK en Göteborg okazu studadsesio kondiĉe, ke AIS povas tie senkoste disponi pri la necesaj salonoj por tri kursoj.

Reformo de regularoj kaj severigo de la studado: Laŭ kolego Quednau la studado estu severigota konforme al Eŭropaj normoj. AIS postulu en nova regularo, dum transirperiodo, 90 anstataŭ ĝis nun 40 studunuojn por la bakalaŭra/magistra ŝtupo kaj altigu poste tiun nombron al 180 studunuoj, por ke la ekzamenoj de AIS havu agnoskancon ene de Eŭropo. Estonte ne plu estu agnoskitaj studunuoj sen kursfinaj ekzamenoj. Kolego Holdgrün atentigas, ke tia amplekso de agnoskitaj studunuoj por finekzamenoj ne ĉie estas postulata, ekzemple ĝi ne necesas ĉe la universitato en Göttingen.

La kelkfoje ne optimuman informfluan kaj kunlaboron ene de AIS kaŭzas ne laste la tro komplikaj regularoj. Tasko de la nuna Senato estu laŭeble rapide proponi amendojn aŭ komplete novajn versiojn de unuopaj reguloj. La Senato dividas inter si la taskojn por preparo de regularŝanĝoj. Transprenu la regulojn koncernantajn la ekzamenojn la direktoro de la Ekzamenofico, kolego Minnaja; tiujn de la studado la direktoro de la Klerigofico, kolego Quednau; pri kotizoj, mastrumado kaj ties apendico okupiĝu kolegoj Wickström kaj Holdgrün; la statuton de AIS kunfandu kun la apendico al la statuto kolegoj Frank kaj Minnaja; la regularon pri kunsidoj traktu kolego Fössmeier; pri rajtoj, devoj kaj alvokoj de sciencistoj okupiĝu kolegoj Fössmeier kaj Frank; pri la honorregularo kolegoj Frank kaj Maitzen; pri la laborregularo de la Senato kolego Fössmeier.

Acta Sanmarinensia: De kolego Wim de Smet venis propono publikigi en la kadro de *Acta Sanmarinensia* sian anglalingvan verkon pri la „Nova Biologia Nomenklatur“, kiu konsumus kompletan jarvolumon. La Senato ne povas akcepti tion atentigante, ke li havas la eblecon publikigi la verkon kiel kromvolumon de *Acta Sanmarinensia* sub la jenaj du kondiĉoj: La verko estu aŭ komplete en ILo aŭ dulingve verkita en ILo kaj aliaj de la aŭtoro elektita etna lingvo, kaj la aŭtoro zorgu mem pri financado de la publikigo.

Agadoj de aliaj klerigejoj de AIS: El inter la diversaj AIS-klerigejoj jam starigitaj aŭ starigeblaj en Brazilo, Bulgario, Ĉeĥio, Koreio, Litovio, Pollando, Rumanio, Ruslando nur malmultaj esperigas pri efika kaj prospera (kun)laboro. Tial en nova regularo estu klare difinitaj la funkcioj de la filioj kaj de klerigejo de AIS.

Taskodistribuo: Kolego Minnaja atentigas, ke nek estis aprobata de la Senato la demisio de la Selata Sekretario nek diskutitaj kaj konfirmeblaj la kialoj por ŝia elpaŝo. En Komárno la Ĝenerala Asembleo erare estis sciigita pri la informo de la Senata Sekretario direktita al la Senato, kaj la Ĝenerala Asembleo ne estas la ĝusta instanco en tiu kazo. Senatano Fössmeier prave rimarkigas, ke tie la prezidanto mem ne volis diskuti pri tio. Kolego Minnaja substrekas, ke dum la lasta komuna duontago en Komárno ne plu estis vokebla senat-kunsido, do tiu punkto estas nun pritraktenda.

Ĉiu Senatano (kun la escepto de la Senata Sekretario) eksplicite deklaras, ke la aparteno de kolegino Lewoc al la Senato ne estas tuŝita de la elekto de kolego Bociort kiel tria vicsekatano. Aliaj interpretoj de la statuto kaj ties suplemento estas malĝustaj. La Senato (kun unu escepto unuanime) voĉdonas jese al la jena rezolucio: La Senato konfirmas sian fidon al la Senata Sekretario kaj ŝia ĝisnuna koncerna laboro.

La Senato aprezas la grandan kaj laŭeble regulkonforman laboron de la ĝisnuna asistanto de la ekzamenofico, Joanna Lewoc. La Senato kun bedaŭro konstatas la neglataĵojn en la informfluo inter la Klerigofico kaj la Ekzamenofico, el kiuj sekvis diversaj administraj obstakloj. Pro tempomanko la Senato ne detale esploras la koncernajn kaŭzojn, despli ĉar pro la sciigo de bankroto de Monda Turismo tio ne plu necesas.

Por eviti estonte similajn neglataĵojn inter la du oficoj la Senato emfazas, ke

– neniu krom membroj de la Ekzamenofico respondu en la nomo de la Ekzamenofico ekzamenajn aferojn inkluzive informojn kaj reprezentojn en la interreto;

– plej malfrue du monatojn antaŭ la ekzameno venu la informoj de la Klerigofico pri studunuoj al la Ekzamenofico;

– la kandidatleteroj iru senpere kaj nur al la Ekzamenofico, kiu en la kazo de serioza kandidatigo senprokraste informas la Klerigoficon.

La Senato subtenas la jam en Komárno prezentitan rekomendon de kolego Minnaja respondi al la supre menciitaj leteroj de Monda Turismo kaj s-ro Kudrewicz, en kiuj ili i. a. aljuĝas al AIS partan kulpon pro la bankroto de MT; AIS devas rifuzi la akuzojn. La Senato decidas, ke oficialan respondon

sendu la vicprezidanto, kiun ankaŭ kiel estron de la Ekzamenofico la falsaj akuzoj plej multe koncernas. Ricevu kopion de tiu letero ankaŭ la de MT kaj s-ro Kudrewicz adresitoj ekstersenataj.

ADoc. Lewoc deklaras, ke pro la klarigoj ricevita kaj la decidoj prenitaj de la Senato la kialoj por ŝia letero de 2002-09-07 estas superitaj kaj tial la letero ne plu estas aktuala.

La prezidanto informas, ke fine de septembro 2002 kolegino Kowalczyk anoncis retiriĝon de siaj taskoj ĉe AIS. La Senato emfaze aprobas la ĝis nun faritan laboron de ŝi, precipe rilate la patronadon de la studentoj el Bydgoszcz, kaj subtenas provojn reprenigi la demision.

Bulgara filio, eprofesorigo de la tiea gvidanto:

ADoc. Leonov transprenu konforme al la regularo la taskon, zorgi pri la starigo de AIS-filio en Bulgario kaj ricevu por tiu tasko la rangon de EProf. (eksterorda profesoro laŭ la regularo pri rajtoj, devoj kaj alvoko de sciencistoj, p. 8.3) ĝis la fino de la nuna deĵorperiodo de la Senato je 2003-12-31. La prezidanto de AIS estas rajtigita plilongigi tiun alvokon, se la starigo de la filio estos sukcesa. [Korekto de la 49a kunsido: „Ankaŭ ADoc. Lewanderska-Quednau ricevu la titolon de EProf.“]

Amekso: Dum sia perreta diskuto en novembro 2001 gvidita de la vicprezidanto kaj finita je 25.11.2001 la Senato kun la plimulto de siaj voĉoj decidis la jenon:

(1) La premio Pirlot por la jaro 2001 estu atribuita al la libro Wandel/Galadi: „La kosmo kaj ni“.

(2) Estas akceptita la „dua rezolucio de Sibiu“, per kiu estas celita faciligo de la organizado dum BUSoj kaj SUSoj. (Rimarkigo de la protokolanto: La „rezolucio“ en siaj esencaj punktoj postulis aprobon de la Ĝenerala Asembleo dum SUS 25 en Komárno. Pri tio atentigis la vicprezidanto je 25.11.2001, kiam li deklaris akceptitaj la du proponojn per reta voĉdonado. La aprobo ne okazis, la „rezolucio“ tial ne validas. Pro tio kaj pro la planitaj regularŝanĝoj la protokolanto rezignas pri vortigado de tiu rezolucio.)

Göttingen, la 24an de novembro 2002

Protokolis:

H. S. Holdgrün, J. Lewoc
(Protokol- kaj Publikigofico)